

## La heroa vivo de Henri Dunant, 11-a parto Claude Gacond, 106-a radioprelego, 1964.12.09 & 12

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroa vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la dekonuan elsendon pri tiu temo.

Henri Dunant ne plu povas elteni la pezon de siaj rememoroj. Li sentas la bezonon ilin skribi. Li serĉas la trankvilecon en loĝejeto, kiu najbaras la ĝenevan katedralon Sankta Petro. Liaj familianoj ne ekzakte scias, kion li faras tie.

Li legas dokumentojn: traktaĵojn pri strategio kaj raportojn pri la itala militkampanjo. Se necesas, li petas informojn al fakuloj per demandaraj leteroj.

Li serĉas la inspiron. Kiam li fermas la okulojn, li revivas la terurajn horojn de Solferino. Tiam li ĵetas sur la paperon siajn impresojn kun furiozo verkante ĝis dudek paĝojn sen halti. Aliajn fojojn li devos atendi dum pli ol dek tagoj la inspiron necesan al la verkado de sola paĝo.

Estas longa laboro. Por la unua fojo Henri Dunant estas kritikema rilate al sia stilo. Dum la somero 1862 li plibonigas siajn frazojn.

La presado okazas dum la septembra monato. **Rememoro pri Solferino** aperas mil-sescent-ekzemplere. Mencio indikas, ke tiu libro ne estas aĉetebla.

Komence de novembro Henri Dunant disdonas sian libron. Li donacas ĝin al siaj familianoj, konatoj, kaj al la potenculoj de la mondo.

Estas granda surprizo en la familio Dunant. Oni fieras, ke familiano sin montras talenta verkisto. En la salonoj de Ĝenevo oni invitas la aŭtoron de **Rememoro pri Solferino**. Tiu libro konvenas al la spirito de la urbo.

El plej diversaj lokoj alfluas leteroj. Ili ne nur esprimas afablajn dankojn, sed plej ofte entuziasmajn apogojn. El ĉie oni petas tiun libron. Henri Dunant devas ĝin dufoje reeldoni. Lia aŭdaco kreskas kun tiu sukceso. Li sendas sian verkon kun akompanaj leteroj, kiuj petas rendevuojn. Sur longaj listoj Henri Dunant notas la nomojn kaj titolojn de la apogantoj: troviĝas reĝoj, reĝinoj, princoj, princinoj, dukoj kaj arkidukoj, verkistoj, sciencistoj, ktp. Multaj el ili esprimas sian naŭzon pri la militado kaj sian esperon vidi kreiĝi sukuristaj volontularoj. Generalo Henri Dufour skribas: *“Oni vidas, kiom da torturoj kaj larmoj kostas la gloro de la batalkampoj... Kutime oni tro tendencas vidi nur la brilan aspekton de milito kaj fermas la okulojn al ĝiaj malhelaj konsekvencoj.”* Henri Dunant notas tiujn dirojn por povi ilin citi, kiam tio necesos.

En decembro angla traduko de tiu libro jam estas presote preta. Ĉu la unua konstrua apogo venos el la anglosaksaj landoj aŭ el franca mondo? Ĝi venos el Ĝenevo mem. Estas interese scii kiel.

En Ĝenevo ekzistas grava societo, kiu okupiĝas pri sociaj kaj homamaj aferoj. Ĝi nomiĝas **Societo pri publika vivo** – en la franca « **Société d'utilité publique** ». Ĝia prezidanto, Gustave Moynier, doktoro pri juro, estas unu el tiuj ĝenevanoj, kiuj, kiel la patro de Henri Dunant, praktikas bonfaradon kvazaŭ profesie. Li estas membro de multaj filantropiaj komitatoj. Li partoprenas kongresojn en Parizo, Bruselo, Frankfurto, Londono, por prezenti siajn ideojn pri filantropio. Legante la libron de Henri Dunant li tuj interesiĝas pri ĝiaj konkludaj proponoj. « *Vi havis genian ideon* », li skribas al la aŭtoro de **Rememoro pri Solferino**. Kaj li proponas la helpon de sia societo por transformi la tezojn de Henri Dunant en realaĵojn.

La membroj de la **Societo pri publika vivo** estas tuj kunvokitaj por « *pridiskuti la proponojn koncerne al la kreo de konstantaj societoj por la sukuro de militaj vunditoj* ». Tiu kunveno okazas la 9-an de februaro 1863. Gustave Moynier prezentas Henri Dunant kaj ties

La heroa vivo de Henri Dunant, 11-a parto  
Claude Gacond, 106-a radioprelego, 1964.12.09 & 12

verkon kaj li proponas profiti de Internacia Kongreso por Bonfarado okazonta en septembro en Berlino, por disvastigi la ideojn de Henri Dunant. Generalo Henri Dufour petas la parolon por priskribi la sintenon de la diversaj eŭropaj registaroj rilate al la proponoj de Henri Dunant. Du kuracistoj ankaŭ parolas. La unua, doktoro Maunoir, apogas Henri Dunant. La dua, doktoro Appia, pruvas la utilecon de konstantaj societoj de sukuristaj volontuloj ne nur en militaj periodoj, sed ankaŭ en pacaj periodoj. Henri Dunant silentas. Oni proponas la elekton de kvinmembra komisiono. La prezidanto Moynier, generalo Henri Dufour, la kuracistoj Appia kaj Maunoir kaj Henri Dunant estas elektitaj.

La postan semajnon, tio estas la 17-a de februaro 1863, jam okazas la unua kunsido de tiu komisiono, kiu fariĝos la **Konstanta Internacia Komitato**, tio laŭ decido de la kvin komisiitoj. Kvin homoj : tio estas kvin temperamentoj kontraŭaj. Gustave Moynier estas raciema kaj netolerema. Henri Dunant estas sentimentala kaj ankaŭ ne facile akceptas kontraŭdirojn. Jen fonto al teruraj konfliktoj. Sed kiel rimarkigos Generalo Henri Dufour, tiuj du tendencoj estas necesaj kaj komplementaj. Li mem estas metodema kaj akordiĝema. Appia ĉefe interesiĝas pri sia fako, la blankardoj. Li estas mistikema. Maunoir, la alia kuracisto, estas skeptikema. En tiu diverseco troviĝas la kaŭzo al multaj longegaj diskutoj aŭ eĉ al disputoj. Sed eble estas ankaŭ dank'al tio, ke tiu komitato povis konstrui ion. Kio unuigas tiujn kvin homojn, tio estas ilia emo al filantropio kaj universaleco. Jen kiel esprimiĝas la influo de la urbo Ĝenevo, tiu urbo de Kalvino kaj Jean-Jacques Rousseau.

Ni multobligos la tekstojn de tiu elsendaro pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-